

Lertiĝo lingva per praktiko

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1991-03-21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni tutspeciale salutas nian fidelan aŭskultanton Richard HOWARD, kiu ne plu instruas la anglan en Ĉinio, sed en Ĉeĥoslovakio, kie li nun loĝas en la urbo Usti nad Labem. Li sendis tri mesaĝojn konigante al ni sian nunan problemon. Ni citas lin :

A.- Regule mi provas aŭdi la « Leterkeston » kaj mi ekĝojiĝis, kiam mi aŭskultis tiun de la 25-a de oktobro. Tiam oni dediĉis multe da tempo al letero mia. Estis interese aŭdi, ke PIV povas helpi al esperantistoj trovi taŭgajn esprimojn kaj bonan lingvaĵon. Mi ne konvinkiĝis pri tio... Alia aŭskultanto, germano, same plendis pri iuj mankoj rilate nian lingvon. Tiaj plendoj ne egalas al iaj ideoj de kontraŭuloj, de niaj malamikoj. Laŭ mi ili egalas al saĝaj asertoj, temas pri „mem-kritiko“. Mi ne dubas, ke, kaj li, la germano, kaj mi anglo, adoras nian lingvon. Mi ekzemple nun instruas la anglan lingvon en Ĉeĥoslovakio. Nun abundas kursoj, lerniloj, instruiloj, novaj metodoj nur por povi helpi al la ĉeĥoj kaj slovakoj kompreniĝi kun la mondo per la angla lingvo... Kaj mi, amanto de la lingvo Esperanto, mi volas en ĝi perfektigi. Kaj jen denove mi troviĝas ĉe vojforkiĝo. Kies stilo, kies lingvaĵo estas modelaj? Kiel esprimi tion-jenon?! Kiel paroli la internacian lingvon internacie? Multajn novajn kaj utilajn vortojn mi malkovras en PIV. Sed nur hazarde... mi serĉas unu esprimon kaj sampaĝe trovas alian kaj enkapigas ĝin... Mi plilarĝigas, pliriĉigas mian vortostokon... Tage mi foliumas en PIV. Mi simple enmanigas la libron kaj ovas ĝin tute sensisteme. Se mi imagas, ke vorto al mi povas utili, mi notas ĝin kaj klopodas uzi ĝin. Tiel mi havas tagan kontakton kun la lingvo kaj espereble altiĝas ĉe mi la lingvonivelo. Pri tio mi tre volus diskuti, korespondi kun seriozaj interesitoj. Ĉu vi povus min helpi ligiĝi kun taŭguloj? Mi nenion kolektas... nur volas interŝanĝi ideojn pri la lingvaĵo, pri gramatiko kaj pri ĉiutaga uzo de Esperanto. Disaŭdigu mian nomon kaj mian nunan adreson, mi petas. Richard HOWARD.

Cl.- Eble inter la hodiaŭaj geaŭdantoj de Svisa Radio Internacia iu aŭ iuj sentas la saman bezonon kaj havus intereson kontaktiĝi kun Richard HOWARD. Ili skribe anoncu sin tra la kanalo de la esperanto-fako de Svisa Radio Internacia, kaj ni skribe donos al ili la adreson de tiu angla samideano Richard HOWARD, kiu instruas la anglan en Ĉeĥoslovakio, sopirante samtempe plilertiĝi en la praktiko de Esperanto.

A.- Ni eklernis Esperanton en 1952, kaj post kelkaj monatoj ni same sentis la bezonon je gvidado en la studo de la lingvo. Same kiel nuntempe Richard HOWARD ni baldaŭ konstatis, ke ne ekzistas superaj lernolibroj. Kaj tiam ege malmultis la esperantistoj kapablaj nin korekti. Ni rimarkis ĉe ili multajn akuzativajn erarojn kaj malriĉan vort-trezoron.

Cl.- En Neuchâtel, kie ni studis, nur du esperantistoj reale scipovis la lingvon : unu e stis Edmond PRIVAT, tiam profesoro de la angla lingvo kaj de ties literaturo en la universitato. Lin ni renkontis de tempo al tempo okaze de kurso pri la usona civilizo kaj de aktivecoj en porpacaj movadoj. La alia esperanto-kapablulo, William Perrenoud, estis profesoro en la supera komerca lernejo. Li gvidis Esperanto-kurson elementan, kiun ni sekvis, kaj estis la aŭtoro de instrumentado: La Ora Metodo. Li prezidis la lokan grupon kaj Svisan Esperanto-Societon. Li akceptis korekti niajn unuajn raportojn en Esperanto.

A.- Sed ni sentis, ke tio ne sufiĉas. Ni sentis la bezonon paroli en Esperanto. Tiam ni mem ekorganizis semajnfinajn renkontiĝojn : po ses en la jaro. La regulo de tiuj studaj aŭ migradaj aranĝoj estis uzi nur Esperanton. Ekde la alveno ĝis la ĝisrevida momento la sola komunikilo estis Esperanto.

Cl.- Sed, vi diros, vi estis ĉiuj komencantoj, do devis manki al vi vortoj.

A.- Ho jes, sed sur la tablo aŭ en nia poŝo troviĝis vortaro, kaj ni konstante serĉis en ili la precizajn terminojn, kiuj mankis al ni, kaj ni notis tiujn novajn vortojn sur tabulon. Ankaŭ ni nin reciproke korektis. Tiuj semajnfinoj estis larĝe malfermitaj al ĉiuj : ne nur al la ĝejnuloj, sed ankaŭ al la lernemaj olduloj kaj al novaj komencantoj, kiuj rapide progresis en la praktiko de la lingvo pro la absoluta malpermeso krokodili.

Cl.- Baldaŭ ni sentis la bezonon je pli longaj aranĝoj, kaj ni komencis organizi ekde la jaro 1954-a dektagajn skirestadojn. Ni luis alpan ĉaledon tre primitivan, kaj ĉiuj partoprenantoj devis kunlabori por kuirado kaj dommastrumado. En la komenco neniu konis la nomojn de la legomoj kaj manĝaĵoj, de la ilaro kuireja kaj de la ĉiutaga vivo. Ankaŭ por ludi ni devis lerni multajn fakvortojn, same por skii, por ŝerci. Reciproka interhelpo kapabligis nin pli kaj pli korekte uzi la lingvon, konsciigis nin iom post iom pri evitindaj nacilingvismoj.

A.- La internacieco de tiuj skiferioj estis tiurilate instrua. Diraĵo, kiu ŝajnis tute kontentiga al franclingvanoj, ne estis komprenebla por alilingvanoj, kio igis nin malkovri pli internacian formuladon de nia penso. Ankaŭ ni konstatis, ke Esperanto rezistas al neologismoj, kiuj ne naskas vortfamiliojn. Novuloj emis uzi la verbojn descendi kaj ascendi, sed tre baldaŭ ili preferis la pli esperantajn verbojn alvali kaj alsupri, kiuj estas pli facile prononceblaj, pli elvokivaj, ne pli longaj kaj pli naturaj. Ni konstatis, ke la neologismemuloj estas ĝenerale izoluloj, kiuj ne havas oftan okazon parole esprimiĝi, aŭ esperantistoj, kiuj ne necese deziras reale komuniki kun la aliaj.

A.- Niaj skiferioj kaj semajnfinoj fariĝis veraj lingvo-ekzercejoj. Kaj ĉar ĉiu povis kontribui per prelegoj, la plej lertaj aŭ kleraj intimigis la aliajn kun legindaj verkoj, gvidis lingvajn forumojn, en kiuj ni debatis pri gramatikaj demandoj de ni ne bone regataj.

Cl.- Lingvo estas komunikilo. Ni multe instigas ĉiujn komencantojn, kiuj deziras progresi, vigle frekventi esperanto-rondojn, kie oni senkrokodile praktikas la lingvon. Kaj se tiuj rondoj ne ekzistas, grupigi parolemulojn kaj maturigi kun ili la lingvouzon. Improvizita semajnfino kun promenado, kun komuna manĝo grupe pretigita, kun kundormado en primitiva dormejo kaj kun kolektiva verkado de raporto kaj anonco de nova renkontiĝo, estas lingve pli produktiva, ol pasiva partopreno en kurso eĉ bonege programita.

A.- Sed okaze de tiuj esperanto-renkontiĝoj estas grave posedi la necesajn referencajn lingvajn ilojn : por konsultado devas nepre troviĝi ekzemplero de la Fundamento de Esperanto, de Lingvaj Respondoj de Zamenhof, de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kaj de Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, tio estas : de PIV kaj de PAG, kaj nacilingvaj vortaroj, kiuj ebligas el la naciaj lingvoj trovi la necesajn fakajn esprimojn en Esperanto.

Cl.- Sed neniam oni kontentiĝu je la trovita vorto: en PIV oni malkovru ĝian difinon en Esperanto mem kaj atente trastuduĉiujn listigitajn ekzemplojn. Tiu lingva esploro ofte malkovrigas fuŝajn uzojn, kiujn oni povas korekti ĉe si mem kaj ĉe la aliaj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND respondos al la leteroj, kiuj amasiĝis en ilia leterkesto. Ĝis reaŭdo !